

& La tombo:

< Rekante 16 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Karel Havlíček-Borovský. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(/DoDo MiSo dodo; dodo LaSo dodo; DoDo MiSo dodo LaSo; dodo LaSo TiTi;

(#Rekantaĵe: SoSo SoSo TiTi So; TiTi LaSo Mi; SoSo SoSo TiTi LaSo Fa; TiTi LaSo Mi Do)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Mi konsilas, knaboj ; al vi sen hezito, ; entombigi vin ne lasu ; ie laŭ la rito.

(×: **En la valo staras ĝi, ; staras la tili' ; En la valo verda staras ĝi, ; staras la tilio.)**

'2 Herb' sur tomb' kreskanta ; estus via fino, ; ĉar la herbon formanĝegus ; kapro aŭ bovino.

'3 En solecan meti ; lasuvi tombeton, ; kaj sur tombo igu planti ; junan tilieton.

'4 La konsilo estas, ; knaboj, tute prava, ; super vi printempe sonos ; kant' de l' birdoj rava.

'5 Sur tombeto via ; floras la tilio ; kaj sub ĝi gejunularo ; ŝercos en Julio.

'6 Kaj la floroj estas ; plenaj de mielo, ; kiun sauĉas kaj kolektas ; malgranda abelo.

'7 Noblan havos finon ; vi en form' miela, ; vin en sia kafo trinkas ; eĉ knabino bela.)